



Normanda Esperanto Bulteno

Organe de l'Union des Espérantistes de Normandie

-N° 60-

- Octobre 1961-

Redaktas : Sro HANNIER-250, boul. Jean Jaurès-ROUEN

IMPRESOJ PRI LA 46-a U.K.

Certe, vi jam atendas la unuajn impresojn de nova kongresano, sed fakte la kongreso en Harrogate estis por mi la I3 a. Tamen, ĝia programo entenis la unuan internacian artan festivalon, kiu estis por mi tute nova sperto, kaj kiun mi ege ĝuis. Mi ne scias, kion mi plej ŝatis : ĉu la jugoslavajn dancojn, tiel admirindajn, ĉu la teatraĵojn, tiel arte prezentitajn, ĉu la ĥorkantojn tiel ravajn... Ĉiu kongresa vespero estis altnivela arta ĝuo, kiu forgesigis la malbelan veteron, ventan kaj pluvan.

Tuta pago ne sufiĉus por mencii la ceterajn interesplenajn programerojn de la Internacia Somera Universitato, fakaj kunvenon kaj aliaj. La ekskursoj ankaŭ lasis al ĉiu partopreninto neforgesablan memoraĵon pri la Norda Maro, la lagoj aŭ la montoj de Yorkshire.

Ĝis la 47-a en Kopenhago !

S-ino J. VINCENT
Les Andelys



ROUEN-A FERVOJISTA GRUPO

Dum la somero, niaj grupanoj iom vojaĝis eksterlande kaj vizitis diversajn gesamideanojn. Tiel kiel, LOISEL en Bulgario renkontis gekorespondantojn, kaj faris multajn kaj belajn fotografaĵojn; GUERRE en Jugoslavio kontaktiĝis fervojistojn kaj invitis ilin por la Normanda Kongreso ROUSIER en Hispanio renkontis amikon de la prezidanto BOSC, kaj ankaŭ esperantistan fervojiston de... Le Mans !!

Post la libertempa periodo, niaj monataj kunvenoj denove komencis (la tria mardo). Por la repreno de nia agado ni sukcesis en du gravaj aferoj :

.../...

Nia Vivo

-Dank'al la klopodoj de nia prezidanto LOISEL, la direktoro de la Okcidenta Regiono subskribis cirkuleron permesanta la studadon de Esperanto en niajn Metilernejoj.

-Dank'al la klopodoj de LOISEL, LEPRETRE kaj ROUSSIER, la regiona gazeto "Paris-Normandie" publikigas esperantan kurson en la "Page des Jeuns" ĉiu lundo.

Cetere ni esperas ke la Turisma oficejo eldonos esperantan informilon pri Rouen. LEPRETRE kaj ROUSSIER prizorgas por la sukceso de tiu afero.

Pri la kursoj, du funkcias en la Metilernejo-Quatre Mares gvidataj de LOISEL, alia en Laborejo-Buddicum gvidata de COUPEUR.

=====

LES ANDELYS

La kongresaj fotoj 1961 estas pretaj (1,20 NF + sen-kosto : 0,25 NF ĝis 6 fotoj).

Ankoraŭ haveblaj estas memorigaj kartoj, kun vidaĵo pri Kastelo Gaillard (1 NF por 10 kartoj aŭfrankite, 8 NF por 100 kartoj)

-KURSO por komencantoj: marde kaj vendrede 16h30 -17 h

-KURSO por progresantoj: sabate : 16 h 30 -17 h 30

-KLUBAJ KUNVENOJ : 1-an kaj 3-an ĵaŭdojn: 10h30-11h30

=====

LE HAVRE

- La fondinto de la Havra Grupo de Esperanto, S-ro GASSE, forlasas nin. Tial la 1-an de Julio, kunvenis la grupo por honori lin. Estis familia rondo, kie ĉiu esprimis sian dankon pro la konstanta helpo de S-ro GASSE al la movado, kaj, ankoraŭ, sian bedaŭron pri lia foriro. Ĉar S-ro GASSE baldaŭ loĝos en Sudo de Francujo, Prezidanto HUET opinias ke la "Sudanoj" estas bonŝancaj, ĉar, li ne dubas ke, kvankam emeritulo, S-ro GASSE daŭre laboros por Esperanto. Tiu, kiu estis la tradukanto de pluraj verkoj, oni eble forgesos; oni ne forgesos la HOMON.

"Ĝis revido, S-ro GASSE ! Kaj memoru ke la Oceana Pordo estas ĉiam malfermata por akcepti vin !".

- Mortis, la 10-an de Aŭgusto, en Varsovio, la edzo de nia bibliotekistino, S-ro André COLLEU, profesoro pri la angla lingvo. Kun sia edzino, li partoprenis la Universalan Kongreson en Varsovio, antaŭ du jaroj. Pacamanto, li, dum sia tuta vivo streĉis siajn fortojn al l'alproksimiĝo de la popoloj. Tial, ĉar ni bone konis lin, ni povas aserti ke tiu ne-uzanto de nia lingvo estis, per la koro, vera Esperantisto. Ke S-ro COLLEU akceptu niajn elkorajn kondolencojn.

- S-ro GASSE, partoprenis, kompreneble, la Kongreso en Harrogate. Cetere, li intencas iri Stokolmon, Tokion... Kiom da Universalaj Kongresoj vidis vin ekde Boulogne-sur-Mer en 1905, S-ro GASSE ?

- S-ro MAMMAUX kaj lia edzino iris, denove, en Jugoslavion. Verŝajne, Esperanto detruis ne nur la lingvajn barojn, sed, plue, malproksimecon.

- S-ro HUET akceptis, somere, familion VAN HULST, de Haarlem (Nederlando). Tiu okaze, dudeko da grupanoj kunvenis la 29-an de julio. La gastoj kaj la gastiganto estis kontentaj, ĉar, pli ol 20 partoprenantoj estas sufiĉe granda nombro, rilate al periodo de libertempo. Dum vizito al la urbo, Harry VAN HULST petis, Esperantlingve, de la Turismoficejo, informojn. La oficisto respondis en la Angla lingvo: "Mi ne estas Anglo, mi estas Nederlandano !". S-ro HUET, kiu ĉeestis, mute, ne ridis, sed, estis ema ridegi, rigardante la mienon de la oficisto, kiu, fine, donis informfolion en Esperanto, petante pardonon (ĉiam en la Angla lingvo!) ĉar ĝi estas malnova.

... Ankaŭ vi, kiam Gesamideanoj eksterlandaj venos en vian urbon, instigu ilin peti informojn en Esperanto. Estas bona propagando !

-S-ino BELIN sukcesis la nacian konkurson de C.N.E.O., kiu estras S-ro Pierre DELAIRE. Tial ŝi, la unuan fojon, uzis praktike Esperanton kun Nederlandanoj. Ni gratulas ŝin.

=====

E K Z A M E N O J

=====

LE HAVRE -18 an de junio 1961

Sukcesis la ekzamenojn meritis la diplomojn de:

ATESTO PRI LERNADO : S-ino COLOMBEL

-Lucie, S-ro COLOMBEL Jean kaj F-ino CLEMENT Renée (Fécampa Grupo); S-ino BELIN Suzanne, S-ro COLLEU André, F-ino HUET Agnès, S-ro LETHEUX Alain, F-ino LEVIGNEUR Daniele, S-ro MILET Charles, S-ro ROGER Alain (Havre grupo).

ATESTO PRI SUPERA LERNADO :

-F-ino BANSARD Monique, S-ino MAMMAUX Janine (Havra grupo)

ATESTO PRI KAPABLECO :

S-ino VINOT Suzanne (Havra grupo)

N I A J N G R A T U Ĵ O J N !

=====


Korespondu !

-Hungara samideano deziras korespondi pri "Kolomb-bredado" -Skribu: S-ron Soós Ferenc, II. Kelet-u 63 OROSHAZA (Hungario).

QUELQUES RECOMMANDATIONS :

-A MMes & MM. les professeurs et responsables locaux: soyez aimables de procéder rapidement au ramassage des abonnements à U.E.N. (2 NF) par an. -Merci - Adressez les fonds, impersonnellement à : Union des esperantistes de Normandie, 63, bd François Ier LE HAVRE.

-A TOUS : N'oubliez pas d'indiquer votre nouvelle adresse au bulletin, F. HANNIER, 250, bd Jean Jaurès à ROUEN



«... capable de faire plusieurs fois le tour du monde ? Elle ne m'intéresse pas : je ne sais pas l'esperanto ...».

Attention !

ESPERANTISTES ISOLÉS

ANCIENS & DÉBUTANTS !

où que vous soyez en Normandie, il y a un responsable de U.E.N. avec lequel vous devez entrer en contact :

EVREUX: Melle MONTAGNE, 5, bld de la Buffardièr.

DOMFRONT: M. VERON, place Petite Bruyère

VIRE: M. SAPERAS, Le Viverot

CAEN : Adj. Chef MARTIN, 16, av. Guynemer

BAYEUX: Melle CHERIE, 12, rue Conseil

PECAMP: M. PERMANNE, 9, rue St Etienne

LE HAVRE: M. HUET, 63, Bld François Ier

ROUEN: M. JOUIS, 67, rue G. Mugnier à Boisguillaume

LES ANDELYS: Mme VINCENT, 13, av. De Gaulle

DIEPPE: M. RETAULT, gare maritime

ELBEUF: M. CHAMARET, Cité Olivier, Cléon

S.N.C.F. ROUEN: M. LOISEL, 163, rue Léon Salva à Sotteville.

Broŝuroj verkitaj kaj ilustritaj de la infanoj.

Eldonejo de la Moderna Franca Lernejo -CANNES.

Lernejo de Ste Marguerite-de-Queyrières (Htes Alpes)

=====

FRANCISKO LA ETA ŜAFISTO

(Tradukis el la franca : S-ino J.VINCENT -LES ANDELYS)

FRANCISKO FORLASAS LA LERNEJON.

Hodiaŭ Francisko forlasas la lernejon. Li devas paŝti la ŝafojn. Oni ne povas ilin sendi al l'Oriol; estas ankoraŭ neĝo. Do estas necese ilin konduki al la kampoj ĉirkaŭ la vilaĝo, kie la nova herbo jam kreskas, aŭ sur la deklivojn, kiuj verdiĝas sub la printempa suno.

Pasintjare, Mario paŝtis la ŝafojn de Francisko. Oni devis pagi po kvin frankoj por bestoj; tio iĝis multekosta !

Ĉijare, Francisko estas sep kaj duon-jara. Estas granda knabo. Li bezonas nenium por paŝti sian ŝafaron la tutan tagon sur la kampoj kaj rekonduki ĝin hejmen en la vespero.

ETA ŜAFISTO.

Nun, se vi renkontus Franciskon, vi tuj vidus, ke li estas eta ŝafisto.

La havas bastonon: hakita frak-sena branĉo. Sed li pli ŝatas sian vipon. La ŝafoj iras pli rapide se oni donas al ili malgrandajn batojn sur la krurojn, kiam ili lantas laŭlonge de la vojeto. En sia poŝo, Francisko havas sian tranĉilon ligita per ĉeneto. Sur sia dorso, li portas sian malnovan dusakon de griza tolo. En tiu dusako li metas sian manĝon.

Nun, Francisko ne ofte lavas sin. Irante laŭ la rivereto, li apenaŭ banas sian vizaĝon per iom da freŝa akvo.

LA ŜAFARO DE FRANCISKO.

Francisko havas dudektri ŝafojn. Estas bela ŝafaro. Li bone konas ĉiujn siajn bestojn. Estas la "moutons" (ŝafoj) kun dikaj volvitaj kornoj, la "tranches", kiuj estas ŝafinoj kun malgrandaj kornoj. Francisko ne konfuzas

ilin kun la "bourines", kiuj havas sur la nazo malgrandajn brunajn makulojn kaj kun la "roussettes", kun flavruĝa lano.

Kaj estas la aro de la "manis" la ŝadidetoj, kiuj saltas kaj kapriolas, kaj kiuj ankoraŭ estas, kiel Francisko, etaj infanoj.

LA METILERNADO.

Francisko iros paŝti kun Mario, por alkitimiĝi la unuajn tagojn.

Mario scias multajn aferojn, kiujn bona ŝafisto devas scii. Li montros al Francisko la plej bonajn "paquiers": la lokoj, kie la herbo abundas kaj kie la ŝafoj manĝas longe ne kurante dekstren kaj maldekstren, ne deviĝante vin kontroli la "damaĝojn", ne donante penon, kiel oni diras.

Mario ankaŭ montros al Francisko kiel oni povas esti feliĉa sur la kampoj, kiel oni restas la tutan tagon kun siaj bestoj ne trovante tempon enui.

Kaj Francisko ankaŭ estos unu el tiuj etaj ŝafistoj, kiuj ne vidas, ke la ombro atingas la pinton de la Granda Monto, kaj ke necesas rapidi por reiri al la vilaĝo antaŭ la nokto.

SUR LA KAMPOJ.

Nun, Francisko pasigas ĉiujn siajn tagojn sur la kampoj. Por li ne plu estas ĵaŭdoj, nek dimanĉoj, nek festotagoj ?

Ĉiuj tagoj estas similaj. Li foriras en mateno, kiam la suno frontas super l'Argentière, kaj kiam la vilaĝo vekiĝas, brua plena. Li malfermas la pordon de la ŝafejo kaj elirigas la bestojn kriante:

Truste !..Truste ! Mani! Mani!

(daŭriĝo en la proksiman bultenon)